

Gazeto




Andaluzia

Andaluzio per si, per Hispanio kaj la Homaro

22-a Jardeko \* Marto 2005 \* N-ro 77

(ISSN 1136-2145)



ARACENA, la naturo kaj  
la historia farigas legendo.

# Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.  
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto**.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto  
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)  
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.  
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ  
REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO (Apartado 5184,  
29080 MÁLAGA, [esperanto@ciudadfutura.com](mailto:esperanto@ciudadfutura.com))  
José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ  
([esperanto14@supercable.es](mailto:esperanto14@supercable.es))

COLABORADORES: Luis SERRANO PÉREZ, José Antonio VALVERDE  
MARTÍN, D-ro Wolfgang GUNTHER, Ángel ARQUILLOS LÓPEZ,  
Tonjo del BARRIO-

## ENHAVO

<b>Eksterordinara Ĝenerala Asembleo de AEU .....</b>	<b>3</b>
<b>Nova Prezidanto de AEU .....</b>	<b>6</b>
<b>Esperanto en Andaluzio .....</b>	<b>7</b>
<b>La Esperantaj Tradukoj de Don Quijote .....</b>	<b>11</b>
<b>Andaluza Literaturo <i>La soldato Johano</i> .....</b>	<b>14</b>
<b>Pri Lingvistiko .....</b>	<b>17</b>
<b>11 Andaluza Kongreso de Esperanto .....</b>	<b>20</b>
<b>Flamenko.....</b>	<b>22</b>
<b>Andaluza Kuirarto .....</b>	<b>23</b>
<b>Atlantika Plonĝado .....</b>	<b>25</b>
<b>Poezia Angulo .....</b>	<b>26</b>
<b>Turismi en Aracena .....</b>	<b>28</b>
<b>Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio .....</b>	<b>31</b>
<b>Fakaj Asocioj .....</b>	<b>33</b>
<b>Lasta Paĝo .....</b>	<b>35</b>

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.  
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.

## Protokolo de la Eksterordinara Ĝenerala Asembleo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

En la urbo Malago, la 8an de januaro 2005 renkontiĝas en la Malaga Haveno la Eksterordinara Ĝenerala Asembleo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo. Prezidas la asembleon S-ro Angel Arquillos López kaj agas kiel sekretario S-ro Francisco Javier Martín Gómez.

### Tag-ordo

\* La asembleon legas kaj aprobas la protokolon de la pasinta Ĝenerala Asembleo okazita en oktobro 2004.

\* Konto-stato je la 31-a de decembro 2004.

Analizitaj la enspezojn kaj la elspezojn okazintaj dum la jaro 2004 oni aprobas unuanime la jenan konto-staton.

Enspezoj: 636'31 eŭroj.  
Elspezoj: 629'40 "  
Favora Saldo: 6'91 "

Pasintjara saldo (31an-dec-2003): 6.733'99 eŭroj.

Nova saldo (31an-dec-2004): 6.740'90 "

\* Buĝeto por la jaro 2005.

Oni aprobas plujvalidigi la buĝeton de la jaro 2004 por la kuranta jaro 2005.

\* Instruado de esperanto.

Dum la jaro 2004 Ángel Arquillos instruis esparnton en la oficiala sidejo de la sindikato CNT en Malago. Ankaŭ s-ro Arquillos instruas la internacian lingvon pere de la reto. Dum la lasta Andaluza Kongreso de Esperanto, okazita fine de oktobro en Sevilo, oni donis 7 diplomojn pri elementa nivelo kaj 6 diplomojn pri meza nivelo.

\* Esperanto en Bibliotekoj.

Oni legis informon prezentita de s-ro Rodríguez Hernández pri ĉi tiu afero. La donacado de libro-metodoj al andaluzaj publikaj bibliotekoj daŭriĝas. Oni prezentis kelkajn dank-leterojn, kiel tiu de la Publika Biblioteko de Onubo. Dum la jaro 2004 ankaŭ oni donacis ekzempleron de “Gran Diccionario de Esperanto” al la Publikaj Bibliotekoj de Malago, Sevilo kaj Kordovo.

\* Propagando de esperanto.

La jaro 2004 estis tre fruktodona ĉi-sence. Nia lingvo kaj movado ĉeestis la festivalon Etnosur en Alcalá la Real (Jaeno), kie oni instruis la lingvon pere de rapida kurso kaj oni prizorgis standon kie oni vendis esperanto-librojn. Pri la ĉeesto de esperanto en ĉi tiu etna festivalo informis la ĵurnalo EL PAÍS (andaluza eldono) kaj la andaluza radio CANAL SUR.

En la monato septembro aperis artikolo en diversaj andaluzaj lokaj periodaĵoj sub la titolo “Emerge Babel” (Leviĝas Babelo). Kvankam ĝi simpatiis al esperanto, oni menciis, ke “neniu parolas ĝin”, tio provokis reagoj de diversaj personoj kaj de Onuba Esperanto-Asocio en la ĵurnalo “Diario de Huelva”.

Ĉe la propaganda-sekcio de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo oni ricevis dum la jaro 2004 kelkajn inform-petojn de Granado, Sevilo, Kordovo kaj Malago. Ĉiuj ricevis respondon.

\* Publikaĵoj.

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo daŭre publikigis dum la jaro 2004 sian oficialan revuon “Gazeto Andaluzia”, sian informilon “Monate ĉe Vi” kaj la reta bulteno “Opiniaro de AEU”. Pri la kvalito de la enhavoj oni konsideras, ke ĝi estas sufiĉe kontentiga. Nur estas necese ne prokrastigi la aperon de la eldonaĵoj kaj peti pliajn kunlaborantojn en ĉi tiuj informaj projektoj.

\* Esperanta Civito.

Daŭriĝas la kontaktoj inter Esperanta Civito kaj Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Kiel sciante, nia asocio aliĝis al la Pakto por la Esperanta Civito, krome 6 membroj de AEU aliĝis ankaŭ individue al la esperanta civitaneco.

Giorgo Silfer kaj Perla Martinelli vizitis la asocion la pasintan monaton decembron 2004. La 18an de decembro D-ro Silfer prelegis en la "Centro Cívico" de Malago pri la temo "La Centjara Fundamento". Post tiu prelego okazis la Zamenhofa Festo organizata ĉi-jare de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo en Malago.

\* Petoj kaj Proponoj.

S-ro Rodríguez Hernández prezentis peton celanta al la plialtigo de la membraro de AEU. La propono temas pri kunvalidigi la membrecon de AEU kaj tiujn de la lokaj esperanto-asocioj de Andaluzio. Tiel, ĉiu membro de la loka asocioj estus aŭtomate membro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, sen devi pagi plian kotizon. La asembleo konsideris favore la proponon kaj petis al la nova ontra estraro pristudi la peton.

\* Elekto de Nova Estraro.

La Ĝenerala Asembleo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo unuanime elektis la jenan novan estraron por la du venontaj jaroj:

- Prezidanto: ÁNGEL ARQUILLOS LÓPEZ
- Vicprezidanto: RAFAEL SEPÚLVEDA BERNAL
- Sekretario: FRANCISCO JAVIER MARTÍN GÓMEZ
- Kasisto: JULIO HERRERO SEGURA.
- Voĉdonanto pri Propagando: JOSE MARIA RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ

Oni aprobis ankaŭ novan adreson por nia asocio, kiu ekde nun estas:  
Strato Anfora, 6 5º D en Malago.

Kaj sen pliaj pritraktindaj aferoj la Prezidanto fermis la Asembleon. Ĉi ĉion mi certigas, vidita kaj aprobita de la Prezidanto.

LA SEKRETARIO

## Nova Prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo



Kiel vi jam legis en la antaŭa paĝo la Eksterordinara Ĝenerala Asembleo de AEU, okazita en Malago la pasintan 8an de januaro, nomumis novan estraron de nia asocio. Inter la novaj personoj ni trovas nian samideanon ÁNGEL ARQUILLOS LÓPEZ, kiu ekde nun estas la nova prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Ángel ARQUILLOS naskiĝis en Linares (Jaeno) en la jaro 1946, li lernis la internacian lingvon en Madrido en la jaro 1979 en la sidejo de la Madrida Esperanto-Liceo, kie tiutempe instruis nia

elstara samideano Augusto Casquero de la Cruz, nuntempa prezidanto de Hispana Esperanto Federacio. Okaze de la 40-a Hispana Kongreso de Esperanto li atingis la diplomojn de “Kapabla Esperantisto” kaj “Esperantista Instruisto”. Dum tiuj jaroj li instruis esperanton en la Madrida Liceo kaj kunlaboris kun la prestiĝa periodaĵo “Heroldo de Esperanto” ene de la branĉo *De lando al lando*.

En Malago li laboras en la kartografia departemento de la Urbodomo. Li instruas esperanton en la sindikato CNT kaj ankaŭ estas tre aktiva en la propagando kaj instruado de la lingvo pere de Interreto. Li ĉeestis ofte E-kongresojn.

El ĉi tiu paĝo ni deziras al li fruktodonan prezidantecon kaj al ĉiuj membroj kaj simpatiantoj de AEU kaj de la andaluza esperanto-movado ni petas kunlaboron.



## ESPERANTO EN ANDALUZIO



### **KORDOVO.-**

La pasintan 17an de februaro okazis en la Urbodomo de Kordovo la publika prezento de la verkaĵo “Francisco Azorín Izquierdo. Arquitectura, Urbanismo y Política en Córdoba (1914-1936). La libro, eldonita de la Universitato de Kordovo, estas aro da prelegoj pritraktantaj la vivon kaj agadojn de Francisco Azorín Izquierdo, elstara arkitekto, socialisto kaj esperantisto kiu loĝis en Kordovo ĝis la jaro 1936, poste li ekziliĝis en Meksikon kie li kunordigis la meksikan esperanto-movadon.

La prezenton de la libro ĉeestis reprezentanto de la kordova urbestrino, la universitata respondeculo de la eldonado de la libro kaj unu el la nepoj de Francisco Azorín. En la plenhoma kunveno de la kordova urbodomo oni aŭdis pri la diversaj agadoj de Francisco Azorín kaj kompreneble ankaŭ pri lia esperantisteco. Unu el la ĉapitroj de la libro, verkita de nia kordova samideano José María Rodríguez Hernández, titoliĝas “Aproximación a la figura y a la obra de Francisco Azorín Izquierdo como esperantista” kaj en ĝi oni pristudas la agadojn de nia elstara samideano kiel esperantisto, kiel esperantisto-socialisto kaj ankaŭ la librojn de li verkitaĵ.

### **SEVILO.-**

La pasintan 14an de marto en Radio Sevilla (radio-ĉeno SER) oni elsendigis programon pri esperanto. Ĝi okazis inter la 12'30-a kaj la 13'30-a horo ene de la programo “Vivir Sevilla”. La registro de la programo okazis dum la esperanto-klaso okazinta ĉiu-vespere organizata de Sevilja Esperanto-Asocio.



## ALMERIO.-

Ene de la programo “Esperanto en la Andaluzaj Bibliotekoj” dum la kuranta jaro 2005 ricevos ekzempleron de la libro “Curso de Esperanto” de Miguel Gutiérrez Adúriz la

provinco Almerio. Jen la kompleta listo de la urboj kaj vilaĝoj kies bibliotekoj ricevos la libro-metodon de esperanto:

- |                       |            |
|-----------------------|------------|
| - Adra                | - Fines    |
| - Almerio             | - Fiñana   |
| - Antas               | - Gador    |
| - Berja               | - Garrucha |
| - Carboneras          | - Macael   |
| - Cuevas de Almanzora |            |
| - Huerca Overa        | - Nijar    |
| - Dalías              |            |
| - Olula del Río       | - Pulpí    |



- |            |               |
|------------|---------------|
| - Purchena | - Velez-Rubio |
| - Tabernas | - Vera        |

Krome, la biblioteko de la Fakultato pri Filologio de la Universitato de Almerio ricevos ekzempleron de la libro “Nuevo Método de Esperanto” de Fernando de Diego.

Ni esperas, ke la disdonado de ĉi tiuj libroj helpos disvastigi kiel eble plej dise la internacian lingvon ankaŭ en la provinco Almerio. Kompreneble, en ĉiuj ekzempleroj aperas la adres-kontakto de la donacanto, tio estas: la Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

## MALAGO.-

\* Malago estis unu el la unuaj urboj en la mondo kie organiziĝis la esperanto-parolantoj ene de loka klubo, tio jam okazis en la jaro 1890. Kaj ekde la fino de la 70-a jardeko de la pasinta jarcento ekzistas seninterrompa esperanto-grupo, kiu naskis, kun la helpo de aliaj grupoj de Andaluzia, Andaluzian Esperanto-Unuiĝon.






Sed male, en Malago ne ekzistis propra loka asocio celanta la disvastigon de esperanto. Tiu afero solviĝis la pasintan 28-an de majo kiam grupo de personoj fondis la Esperanto-asocion “Suna Marbordo”. Al la unua komitato apartenas Juan Siles, Jesús García kaj Javier Martín kiuj demarŝos por leĝigi la asocion kaj peti al la oficialaj instancoj propran sidejon. La honora prezidanto de la nova asocio estas la eks-prezidanto de AEU Andrés Martín Gonzáles kaj ankaŭ Julio Herrero apartenas al la grupo de personoj kiuj deziras oficialigi la esperanto-movadon en la ĉefurbo de la Suna Marbordo.

\* La malaga esperantistaro daŭre laboras por la organizado de la 11-a Andaluza Kongreso de Esperanto. Du tagoj antaŭ la okazigo de la kongreso, tio estas la 6-a kaj 7-a de oktobro okazos seminario pri esperanto kies direktoro estos Giorgio Silfer. Temas pri seminario speciale organizita por tiuj kiuj deziras perfektigi sian lingvan nivelon kaj ankaŭ por tiuj kiuj deziras pliriĉigi sian esperanto-kulturon ĉar oni pritraktos temojn rilatajn al la literaturo kaj la historio de la internacia lingvo.

\* Temas pri grandega plezuro informi pri la fondiĝo de nova esperanto-grupo en Andaluzio, kaj plie se temas pri grupo al kiu apartenas ĉefe gejunuloj. Dum la sevila kongreso ni sciis pri la fondiĝo en la jaro 2003 de la Esperanto Klubo Aksarkio, fondita de gejunuloj en la malaga vilaĝo Velez-Malaga. Ĝia celo estas instrui esperanton kaj disvastigi la ekziston de la internacia lingvo en la komarko Aksarkio, orienta parto de la provinco Malago. Vi povos koni pri ĉi tiu nova esperanto-grupo se vi vizitas ĝian TTT-paĝon ĉe <http://es.geocities.com/lorcacola/esperanto.htm>



Vélez-Málaga en la  
Aksarkio




## La Esperantaj Tradukoj de Don Quijote de la Mancha

Tonyo del Barrio

---

La bakalaŭro Sansón Carrasco sciigis al Don Quijote ke kiam la dua parto de la romano aperis jam estis presitaj pli ol dek du mil ekzempleroj de lia historio, kaj ke “mi kredas, ke ne ekzistos regno, en kies lingvon oni ne tradukos ĝin”. Don Quijote respondis ke “unu el la aferoj, kiuj sendube


donas la plejan plezuron al viro virta eminenta, konsistas en tio, vidi sin kun bona famo, tiel en la opinio de la homoj, kiel en la paĝoj de la libroj”. Ambaŭ neniel suspektis ke ilia historio estis rakontota en lingvo kiu ne naskiĝos ĝis preskaŭ tricent jarojn poste kaj kiu, krome, ne apartenas al iu ajn “regno”. Ni aludas al Esperanto, kompreneble.



Kiel bone sciante, Esperanto estis prezentita al la mondo per libro eldonita en Varsovio en la jaro 1887, kies aŭtoro Lazaro Zamenhof, uzis la pseŭdonimon “D-ro Esperanto”. Tiu libro jam enhavis tradukon inter aliaj ekzemplaj tekstoj, kaj multaj el la unuaj tekstoj kiuj estis eldonitaj en la lingvo estis ankaŭ tradukoj. Foje kiel rimedo por pruvi la kapablojn de la nova lingvo, foje pro tio, ke la unuaj esperantistoj havis la deziron montri sian nacian literaturon al la parolantoj de aliaj lingvoj.

En la kazo de Hispanio, la elekto estis evidenta, kaj unu el la unuaj celoj estis, kompreneble, la traduko de Don Quijote. Do, tuj post la fondiĝo de la unua hispana asocio, la “Sociedad Española para la Propaganda del Esperanto”, kaj profitante la trian jarcenton, en 1905, de la unua eldono de la romano, oni kunvokis kelkajn solenadojn, inter ili internacian konkurson de tradukoj de kelkaj partoj de la verko. La tekstoj aperis en la gazeto *La Suno H ispana*, organo de la menciita asocio. La venkintoj de la konkurso estis Carlo Bourlet, Geo C. Law kaj Vicente Inglada, kaj la tekstoj estis publikigitaj kiel libro, sub la titolo “Tri ĉapitroj el la hispana verko: La sprita junkro Don Kiĥoto de Manĉujo / Miĥaelo de Cervantes Saavedra, eldonita de la Murcia Esperanto-Grupo.

Tiu unua provo estis, kompreneble, tre parta kaj nekompleta. La hispana esperanto-movado ne havis sufiĉan maturecon aŭ organiz-kapablon por taŭge entrepreni tian taskon. Spite de tio, oni ne rezignis la celon, kvankam la plej elstaraj tradukistoj, ĉefe la supremenciita Inglada, kontentiĝis per tradukado de aliaj verkoj pli facilaj. La sekvanta traduko de la verko de Cervantes estis intence parta, fare de elstara membro de la tre matura kataluna esperanto-movado. Frederic Pujulà y Vallès publikigis tradukon de tiu parto de la aventuroj de Don Quijote kiu okazas en Barcelono, sub la titolo *Don Quijote de la Mancha en Barcelona: 5 ĉapitroj*. Ĝi estas eldonita en Berlino en 1909, en la libro serio Internacia Esperantista Biblioteko. La teksto estis republikigita en 1924, ĝi estas nun legebla per Interreto kaj oni povas konstati ke la stilo videble pliboniĝis. Iom poste oni faris alian partan provon. Tiufoje la inicianto estis la plej konata hispana esperantsito, la tiama prezidanta de la Hispana Esperanto Asocio, Julio Mangada Rosenörn. Mangada havis la planon



krei libroserion de hispana literaturo tradukita en esperanton, kaj li donis ekzemplon tradukante kaj eldonante du librojn kun verkoj de Cervantes: unuflanke, du el la Ekzemplodonaj Noveloj (“Du junaj frajlinoj” kaj “Korneliino”) kaj, aliflanke la komencon de Don Quijote. Ambaŭ verkoj estis eldonitaj en la jaro 1927, kaj tiu laboro estis nova parta provo, pro tio ke Mangada mem konsciis pri siaj mankoj kiel tradukisto, kaj neniu hispana esperantisto sekvis lian ekzemplon. Elstara esperanta verkisto el Nederlando daŭrigis, tamen, la laboron.

Hindrik Jan Bulthuis tradukis la tutan verkon, kiun oni ne povis eldoni kaŭze de la malfacila ekonomia situacio de tiu epoko. La hispana enlanda milito kaŭzis gravan stagnon en la hispana esperanto-movado kaj, sekve, en ĝiaj literaturaj projektoj. Oni devis atendi ĝis la jaro 1955 por vidi alian provon, denove partan pli koheran. Luis Hernández Lahuerta, tiama sekretario de Hispana Esperanto-Federacio (tiel nomita nelonge antaŭe) publikigis unu el la duosendependaj noveloj kiuj aperas en la unua parto de Don Quijote, “Novela del Curioso Impertinente”.

La libro estis eldonita en Valencio sub la titolo “La Malprudenta Scivolulo”. Ni finfine alvenas al la kompleta kaj kanona esperanta traduko de la romano de Cervantes. Temas neeviteble pri verko de la plej elstara

Tradukisto de hispanaj beletraĵoj en esperanton, Fernando de Diego. De Diego estas unu el la plej fekundaj kaj respektataj tradukistoj en la esperanta mondo, kaj li tradukis en ĉi tiun lingvon verkojn de tre diversaj aŭtoroj. Ni menciuj inter ili Federico García Lorca (“Cigana Romancaro”), Pío Baroja (“La Arbo de la Sciado”), Camilo José Cela (“La Familio de Pascual Duarte”), Ramón María del Valle Inclán (“Tirano Banderas”), Pablo Neruda (“Dudek Poemoj amaj kaj unu Despera Kanto”), Rómulo Gallegos (“Doña Bárbara”) kaj Gabriel García Márquez (“Cent Jaroj da Soleco”), kaj ankaŭ verkojn de Castela, Balzac kaj Hemingway, krom multaj aliaj mallongaj verkoj kiuj aperis en diversaj gazetoj kaj antologioj.

La traduko de Don Quijote estas vera literatura monumento, inda je la originala romano. De Diego dediĉis dudek jarojn al la laboro traduki la tutan tekston, ne forgesante la poemojn, la proverbojn kaj la citaĵojn kiuj aperas en la romano, kaj tiel li ne nur faciligis la legadon de la libro al homoj de ĉiuj landoj, sed ankaŭ kreis belebran verkon plenan je merito.



Fernando de Diego  
(1919 – 2005)

Ni devas diri ion ankaŭ pri la eldono, kiu estis grafa defio por la hispana esperanto-movado. La verko estis eldonita en la jaro 1977 de la “Fundación Esperanto”, societo kreita kelkajn jarojn antaŭe, laŭ peto de Hispana Esperanto-Federacio en Zaragozo, impulsita de la loka grupo en tiu urbo. La esperanto-movado ŝuldas ankaŭ specialan dankosenton al la mecenateco de la familio Manteca-Cano, de Alakanto, kaj de Víctor Ortiz, de Zaragozo. La libro enhavas pli ol okcent paĝojn kaj estas ilustrita per la famaj gravuraĵoj de Gustavo Doré. La titolo estas “La Inĝenia Hidalgo Don Quikote de la Mancha”. Ĉi tiu eldono kronas la strebojn de hispanaj esperanto-parolantoj proprezenti al ĉiuj sian plej universalan verkon, en la plej universala lingvo.

## ANDALUZA LITERATURO

(tradukita en esperanton)

### LA SOLDATO JOHANO

de FERNÁN CABALLERO  
trad. J.M.R.H.

Jen la historio de kampara knabo, senhejma kaj ne-riĉa, kontraŭvole rekrutita. Li servis en la armeo dum ok jaroj, poste li realiĝis dum pliaj ok kaj fine dum aliaj ok jaroj. Kiam tiu tempo pasis li jam estis sufiĉe maljuna kaj en la armeo utilis eĉ ne por labori ĉe la kantino. Do, la armeo definitive forpermesis lin kaj li ricevis panon kaj ok monerojn, tio estis lia saldo.

Irante tra la vojo, meze de la kamparo, li pensis:

“Ho! Soldato Johano, kia fiasko! Post 24 jaroj da milit-servo tion kion mi atingis estas nur peco da pano kaj ses moneroj. Sed ve, nenion mi atingos se mi plendas, nur malpurigi mian sangon.

Do, li piediris kaj kantis:

“Mia buŝo odoras je aĉa manĝo  
kaj mia kolo je bant-kravato,  
mia dorso je sako  
kaj miaj manoj je pulvo.

Tiutempe estis surtere Nia Sinjoro  
Jezuo Kristo kaj akompanis lin kiel  
serviston Sankta Petro. Ili renkontis  
la soldaton Johanon kaj Sankta  
Petro almozpetis lin.



“Kion mi povas doni?” –diris la soldato Johano- “mi, kiu post 24jara fidela servo al la reĝo atingis nur ĉi pecon da pano kaj 6 monerojn”. Sed Sankta Petro insistis kaj la soldato Johano finfine diris: “Ek, kvankam post servi al la Reĝo dum 24 jaroj mi posedas nur pecon da pano kaj 6 monerojn mi kundividis la panon kun vi”. Li prenis tranĉilon kaj dividis la panon en tri pecoj. Li donis du pecojn al ili kaj por li mem restis la tria.

Je du leŭgoj la soldato Johano renkontis denove Jezukriston kaj Sanktan Petron kaj ĉi lasta denove almozpetis. “Pajnas al mi –diris Johano- ke mi jam rekontis kun vi antaŭe kaj, ke mi jam konas vian vizaĝon, sed ve! Kvankam post 24 jaroj da fidela servo al la Reĝo mi havas nur pecon da pano kaj 6 monerojn kaj, ke el la peco da pano nur restas ĉi parto... mi kundividos ĝin kun vi”.

Tion lin faris kaj li rapide manĝis sian propran parton, tiel li evitus novan almozpeton. Kiam la suno malleviĝis li trovis triafoje Jezuokriston kaj Sanktan Petron, kaj ĉi lasta denove almozpetis. “Mi ĵurus, ke mi jam kundividis mian panon kun vi antaŭe –diris la soldato Johano-, tamen, kvankam post servi al la reĝo dum 24 jaroj mi ricevis nur pecon da pano kaj 6 monerojn mi kundividis la monerojn kiel mi dividis la panon”. Li tiam prenis la 6 monerojn, li donis 4 al Sankta Petro kaj restis 2 por li.

“Kien mi povos iri kun ĉi tiuj moneroj?” –pensis Johano- “nur restas labori kaj eĉ ĵeti mian animon se mi deziras manĝi.



“Majstro - diris Sankta Petro al Jezuokristo- faru vin ion favore al tiu kompatindulo, kiu post servi dum 24 jaroj al la reĝo kaj resti al li nur pecon da pano kaj 6 monerojn li kundividis sian riĉecon kun ni”. “Jesja – respondis Jezuo- voku lin kaj demandu

kion li deziras”. Tion faris tuj Sankta Petro kaj la soldato Johano, post pripensio, respondis, ke lia sola deziro estis trovi en sia dorsosako tion kion li dezirus. Kaj tiun favoron li ricevis.

Kiam la soldato Johano venis en vilaĝon li vidis en vendejo pecojn da pano pli blankaj ol la jasmenoj kaj ankaŭ manĝindajn viandojn. “En la dorso-sakon” - li kriis, kaj jen la pecoj da pano kaj la kolbasoj kiuj iris rekte en la sakon. Tiunokte Johano manĝis kiel ĉiopova reĝo. Kiel ĉiuj malmobilizitaj soldatoj Johano rajtis senpagan loĝadon, do li eniris en la urbodomon por peti tion. “Mi estas povra soldato, sinjoro –li diris al la urbrestro- kiu post 24 jaroj da fidela servado al la reĝo mi trovis nur pecon da pano kaj 6 monerojn kiujn mi elĉerpis tra la vojo”. La urbrestro diris al li, ke li rajtus gastigi en apuda domo, kie neniu kuraĝis eniri ĉar tie mortis kondamnito, kiu ankoraŭ tie loĝis kiel fantomo. Sed se li estus kuraĝa li povus eniri kaj eĉ trovi tie grandajn trezorojn ĉar la kondamnito estis tre riĉa. “Sinjoro, la soldato Johano nek ŝuldas nek timas- li respondis- do, tien mi iros”.

En tiu fantoma domo la soldato Johano trovis grandajn riĉaĵojn, la kelo estis plena je bongustaj boteloj kaj la provizejo estis abunda. Unue li plenigis grandan vason da vino ĉar li pensis, ke la ebruloj ne timas, poste li ekbruligis

kandelon por ion manĝi. Kiam li sidiĝis li aŭdis voĉon ene de la fumo-tubo susuranta.

- “Ĉu mi defalos?”
- “Defalu se vi tion deziras –respondis Johano kiu jam trinkis du vasojn da tiu bonega vino- ĉar tiu kiu servis al la reĝo dum 24 jaroj kaj atingis nur pecon da pano kaj 6 monerojn nek timas nek ŝuldas.

Post diri tion defaliĝis el la fumo-tubo, tuj apud li, la krurilo de viro. La haroj de la soldato Johano hartiĝis kvazaŭ li estus persekutita kato. Li prenis la kruĉon kaj batis ĝin kontraŭ la tablon.

- “Ĉu vi deziras esti enterigita?” – demandis Johano.


La krurilo per sia fingro diris ne.

- “Do, putriĝu tie” –respondis la soldato Johano.

Denove la voĉo ekkriis :

- « ĉu mi defalos ? »
- “Defalu, se vi tion deziras –respondis Johano batante denove la kruĉon- ĉar tiu kiu servis dum 24 jaroj al la reĝo nek timas nek ŝuldas”.

Tiam defaliĝis la alia krurilo. Poste faliĝis la korpo kaj eĉ la kapo mem, tiam ĉiuj partoj de la korpo unuiĝis sub terura aspekto.



- “Soldato Johano –kriis la skeleto- mi vidas, ke vi estas kuraĝa”.
- “Jes, sinjoro –li respondis- mi tia estas, mi konis nek la timon nek la satiĝon kaj malgraŭ tio vi devos scii, ke mi atingis nur pecon da pano kaj 6 monerojn post 24 jaroj da fidela servo al la reĝo”.
- “Ne priploru pro tio –respondis la skeleto- ĉar se vi faras tion kion mi diros al vi, vi savos vian animon kaj vi sendube estos feliaa. Ĉu vi deziras tion?”



- “Kompreneble jes, sinjoro; kvankam tio temus pri unuigi viajn brakojn kaj krurilojn por eviti novajn defalojn.”
- “Sed –diris la skeleto- mi pensas, ke vi etas ebria.”
- “Ne, tute ne. Mi estas nur kontenta. Via moŝto devas sciiĉ, ke ekzistas tri klasoj da ebrieco: la unua, aŭskulti kaj pardoni; la dua, treni la mantelon kaj la tria, fali survizaĝe la teron. Mi ankoraŭ ne trapasis la unuan parton.
- “Do, akompanu min” –diris la skeleto.

La soldato Johano, kiu estis ebrieta, stariĝis kaj vagadis de unu loko en alian kaj li prenis la kandelon, sed la skeleto estingis la flamon. Ne estis necesa la kandela lumo ĉar la okuloj de la skeleto lumigis ĉion kiel du fornoj.

*(Fino de la unua parto. Daŭrigota venonnumere).*

vizitu kaj partoprenu en la ttt-paĝo  
de la andaluza esperanto-movado.

**vizitu kaj partoprenu en la ttt-paĝo  
de la andaluza esperanto-movado.**

www.esperanto-andalucia.org  
**www.esperanto-andalucia.org**

# Pri Lingvistiko

## Mallonga Trarigardo (Dua Parto)

Andrés Martín González

Apud Bopp aperis aliaj gravaj lingvistoj, kiaj Jacob Grimm, la etimologo Pott, Kunn (prizorginta samtempe la Lingvistikon kaj la Komparan Filologion), la hindistoj Benfey kaj Aufrech, ktp. Lastaj elstaraj anoj de ĉi tiu skolo estis Max Müller, Georg Curtius kaj August Schelicher. Tamen, kvankam ĉi tiu skolo havis la nediskuteblan meriton malfermi novan kaj fruktodonan kampon, ĝi ne konsistigis aŭtentikan lingvistikon, ĉar en sia esploro oni prizorgis neniam pri la celo atingebla per la komparado. Tial, oni povas jesi, ke ĝi estis kompara sed ne historia.

Ĝis ĉirkaŭ 1870 oni demandis neniam pri la maniero de la ekzisto de la lingvo. Ja lingvistiko naskiĝis el la studo de la latinidaj kaj germanaj lingvoj. La esploro de la latinidaj lingvoj, komencita de la germana filologo Diez, ege kontribuis al la alproksimiĝo de la lingvistiko al ties vera objekto.

Whitney estis la unua impulsanto. Poste formiĝis la skolo de la Neogramatikistoj kies ĉiuj ĉefoj estis germanaj, nome, Karl Brugmann, H. Osthoff, W. Braune, Eduard Sievers, Herman Paul, Leskie, ktp



Ili rigardis, el la historia vidpunkto, ĉiujn rezultatojn de la komparado kaj ili metis la faktojn laŭ ties natura ordo. Danke al la neogramatikistoj oni rigardis la lingvon ne kiel ion evoluanta el si mem, sed kie la rezultaton de iu kolektiva spirito de la lingvaj grupoj.

La neogramatikistoj opiniis, ke por koni la lingvon ne necesas realigi komparan studo de la hindoeŭropaj lingvoj, kiel agadis liaj antaŭuloj, sed

Atenti al la nuna lingvo kiel homa rezultato kaj prizorgi la fonetikajn leĝojn estantajn nepre ene de la homa komunumo.

Baldaŭ respondis al la neogramatikistoj ties kontraŭantoj (pleje hindoeŭropeistoj) kiaj Georg Curtius, Graziado, I. Ascoli kaj Hugo Schuchardt. Aliaj, kun Karl Vossler, la fondinto de la idealisma skolo ankaŭ kontraŭis al la neogramatikistoj.

La geografia lingvistiko, komence nomita “Dialekta Lingvistiko”, konsistigis grandan antaŭeniron ene de la scienca lingvistiko ĉar ĝi montris, per mapoj, la rezultaton de sia laboro.

Ferdinand de Saussure kreis la Sociologian Lingvistikon. Laŭ Saussure la Lingvistiko estas branĉo de la Semiologio kaj li dividis ĝin en Sinkronion (t.e., stato de la lingvo) kaj Diakronion (t.e., fazo de evoluo de la lingvo). La lingvistiko estigita de F. de Saussure la Strukturan Lingvistikon laŭ kiu la pervorta esprimado de la homo konsistigas strukturon. Ene de la Struktura Lingvistiko troviĝas tri skoloj:

- a) tiu de Ĝenevo, kies ĉefoj estis Bally kaj Frei;
- b) tiu de Prago, gvidata de Roman Jakobson, Nikolai Trubetzkoy kaj André Martinet (ĝi komencigis la novan vojon de la Fonologio)
- c) tiu de Kopenhago, kun Hjelmslev (la fondinto de la Glosematiko), Uldall, Bröndal kaj Togeby. La amerikaj lingvistoj Blomfield, Bloch kaj Chomsky ankaŭ havas sian specialan manieron pritrakti la lingvistikon kaj tial oni rajtas paroli pri amerika skolo.



Ferdinand de  
SAUSSURE

Unu el la postaj tendencoj estas la aplikado de la matematikoj al la lingvaj studoj per la uzo de statistikaj donitaĵoj. Zipf hipotezis, ke la lingvon determinas unuflanke la emo de la parolanto ripeti terminojn kaj uzi “ĉiuzajn vortojn”, aŭ uzi tre ofte la montran pronomon kaj, aliflanke, la postulo de la aŭdanto petanta la plej grandan klarecon. Inter ambaŭ emoj estis iu ekvilibro montrita de Zipf ekvacie. Ĉimaniere Guiraud konkludas, ke la plej mallongajn vortojn oni uzas pli ofte, dum la malpli oftaj estas tiuj kiuj enhavas pli grandan nombron da fonemoj. La teorio de la informado pruvis, ke en ĉiu sistemo de signoj etas iu distribuado ebliganta maksimumon de informado per minimuma konsumo de energio.

## 11-a Andaluza Kongreso de Esperanto (provizora programo)

**Loko:** Centro Cívico de Málaga, Avenida de los Guindos n-ro 48.

### Sabaton la 8-an de oktobro

(Koridoro kaj Salono Benamargosa)

10,00 / 11,45      **Akceptejo**  
(disdonado de dokumentaro al gekongresanoj)

(Salono Canillas de Algaida)

11'45      **Inaŭguro** (Urba Magistratano, prezidantoj de AEU kaj de Malaga E-Grupo).  
**Salutvortoj** (de la delegitoj de la ĉeestantaj grupoj).

12'00      **Akto kunmemore al la 4-a Centjariĝo de Don Kihoto.**  
(Publika legado de la du unuaj ĉapitroj de la verko "La Inĝenia Hidalgo Don Quijote de la Mancha" fare de esperantistoj el 12 diversaj landoj).

12'30      **Prelegoj.**  
1. "Don Quijote en ne hindoeŭropa lingvo: la hungara traduko" de la profesoro Giorgio Silfer.  
2. "Esperanto kun andaluza akĉento: la unua libro-metodo de esperanto eldonita en Hispanio, 1890)" de la AEU-estrarano José María Rodríguez Hernández.

14'00      **Tagmanĝo.**

16'30      **Teatraĵo** (aranĝita de Onuba Esperanto-Asocio).

17'00      **Esperanto en aliaj landoj** (kun partopreno de la eksterlandanoj ĉeestantaj).

18'00      **Projekcioj** (filmoj, videoj, DVD, lumbildoj).

19'00 **Esperanto en Andaluzio** (debato pri la movado en nia komunumo).

21'00 **Noktomanĝo.**

De la 10'00a ĝis la 21'00a horo funkcios la informejo por informi al la gekongresanoj kaj al la ĝenerala publiko.

### **Ekspozicioj**

- Libroj en esperanto kaj aliaj organizata de AEU.
- Filatelaĵoj en esperanto de Cao Xionglin, prezidanto de Nanchang-a Esperanto-Asocio).

Dum la unua tago de la Congreso funkcios **libroservo** (kursoj, libroj, vortaroj, diskoj, videoj, DVD, ktp...) de SATEH kaj ankaŭ de AEU.

### Dimanĉon, la 9-an de oktobro

(Koridoro kaj Salono Benamargosa)

10'00 **Vizito al la urbo** (per duetaĝa turisma aŭtobuso).

14'00 **Tagmanĝo kaj adiaŭo.**

- **Antaŭkongreso:** la tagojn 6an kaj 7an de oktobro okazos antaŭkongreso konsistanta el la jenaj aranĝoj:
- - Seminario (en esperanto).
- - Rapida kurso de esperanto por komencantoj.

## FLAMENKO

### LA MINAJ KANTAĴOJ

La kantaĵoj nomitaj *taranta*, *cartagenera* kaj *minera* naskiĝis fore de la kutimaj flamenkaj lokoj. Laŭ la esploristoj de la flamenka historio ĉi tiuj kantaĵoj vere apartenas al la levantena zono, tio estas la mediteraneaj regionoj Murcio kaj Valencia, sed poste ĉi tiuj kantaĵoj flamenkiĝis. Ĉi tiu flamenkiĝo okazis ĉirkaŭ la murcia urbo La Unión kaj la ĉefa kialo de ĉi tiu proceso estis la alveno de andaluzaj enmigrintoj en la riĉajn minejojn de tiu zono.

#### La Taranta

La *taranta*, krom esti mina kantaĵo, ankaŭ ekzistas en la provincoj Jaeno kaj Almerio. Iuj asertis, ke la *taranta* flamenkiĝis kiam ĝi estis aŭskultata kaj rekantata de la andaluzaj ministoj kiuj laboris en La Unión kiam ili iris aŭ revenis el la minejo. Sed tio plejble estas ne-certa, ĉar la *taranta* estis kantaĵo propra de la profesiaj kantistoj.

Tamen la plej gravaj kantistoj kiuj praktiktis la *taranta* ja baziĝis la tekstojn sur la spertoj kaj suferoj de la ministoj. Do, almenaŭ laŭ la tekstoj de la kantaĵoj oni povas aserti, ke la *taranta* temas pri min-flamenka kantado, kvankam ne absolute.

#### La Cartagenera

Denove temas pri ne-andaluzaj flamenka kantaĵo, ĉar ĝi ĉajnas vere kantaĵo el la murcia aŭ kartagena regiono. Ĝi estas tute simila la la tiel nomata "*cante de la madrugá*". La tekstoj ankaŭ ĉefe rakontas la vivon kaj la suferojn de la ministoj de tiu zono.

#### La Minera

Oni konas la inicianton de ĉi tiu kantaĵo, temas pri "El Rojo el Alpargatero", temas pri suferanta kantaĵo kiu ĉiam rankontas, eĉ dramatike, la terurajn vivkondiĉojn de la ministoj.

La flamenkaj min-kantaĵoj estas gravega parto de la nuntempa flamenka kantado. Pro tio, unu el la plej konataj kaj altkvalitaj flamenkaj festivaloj ekzistantaj nuntempe en Hispanio estas tiu kiu okazas ĉiusomere en la murcia urbo La Unión, sub la nomo "Festivalo de la Min-kantado". Vizitinda spektaklo se vi deziras koni la flamenkon.

Sankta Petro, post v  
almozpetado , la so  
jam preskaŭ nenion  
Jezuokristo doni al  
speciala. Jezuo resp  
ke li donus al la sold  
petus kaj Sankta Pet  
kion li bezonus.

## ANDALUZA KUIR-ARTO

### La ajo-pringue

La viando estis luksaĵo ĉe la tabloj de la andaluza popolo dum la pasintaj jarcentoj, tamen ekzistis receptoj bazitaj sur la restaĵoj de la buĉado de la porkoj. Oni ne devas forgesi, ke ĝis antaŭ kelkaj jardekoj la pork-buĉado estis speciala festo kiu renkontigis la familianojn kaj provizis ilin per viando por la tuta jaro.

Unu el tiuj receptoj estas la *ajo-pringue*.

Jen la ingredientoj por 4 personoj:

½ kilogramo da pano.  
300 gramoj da grasa lardo.  
300 gramoj da pork-hepato.  
1 ajlo-kajo.  
1 kulereto da ruĝa papriko.,  
1 kulereto da nigra papriko.  
1 kulereto da cinamo.  
Karofilo.  
Oleo.  
Salo.

Jen la farado:

- Dispecetigu la panon, prenu nur la molan internan paperon. Metu ĝin en terpoton.
- Aldonu la spicojn (paprikon ruĝan kaj nigran, cinamon kaj karofilon).
- Tranĉu la grasan lardon laŭ unu-centimetraj tranĉaĵoj.
- Distranĉu la pork-hepaton en pecoj kaj senĉeligu la panon.
- En paton verĉu malgrandan kvanton da oliv-oleo, fritu la lardon kaj demetu ĝin, ne verĉu la oleon, ĝi estos necesa poste.
- Varmigu akvon en alia poto.
- Fritu la hepaton kaj ajlon en la oleo kie oni fritis la lardon.
- Demetu la hepaton kaj la oleon kaj pistu la tutaĵon. Metu ĝin en alia loko.
- En tiu sama miksaĵo da oleo kaj graso fritetu la panon kaj aldonu la varmigitan akvon ĝis atingi specon da pureo.
- Aldonu la hepaton kaj la ajlon, kaj finfine la salon laŭplaĉe. Movu la tutaĵon dum 20 minutoj.

Anstataŭ kuleron uzu la pan-ŝelon,

kaj kompreneble....

**BONAN APETITON !**

## 11-a Andaluza Kongreso de Esperanto

### Antaŭkongreso: 6-an kaj 7-an de oktobro.

Okazos rapida kurso por interesitoj en la *Centro Cívico*, avenuo Guindos n-ro 48 en Malago. Giorgo Silfer gvidos seminarion por tiuj kiuj volas perfektigi sian scipovon de la lingvo. Giorgo Silfer estas aŭtoro de romanoj, poemoj, teatro-verkoj, libroj pri literaturo kaj interlingvistiko kaj ankaŭ aŭtoro aŭ tradukanto de kanzonoj, de 1995 li estras la Kulturano Centron Esperantistan en Svisio.

### Kongreso: 8-an kaj 9-an de oktobro

Same ĝi okazos en la *Centro Cívico* de Malago (adreso supre indikita). Estas eble gasti kaj manĝi en la kongresejo, kvankam tio povas certigi nur al la 50 unuaj aliĝintoj. Jen la prezoj:

- Aliĝo al la Kongreso: 10 eŭroj.
- Aliĝo al la Kongreso kaj restado en la kongresejo, inkluzive maten-manĝo, vesper-manĝo kaj nokto-manĝo nur por la 8-a de oktobro: 28 eŭroj.
- Aliĝo al la Kongreso kaj restado en la kongresejo, inkluzive maten-manĝo, vesper-manĝo kaj nokto-manĝo por la tagoj 6-a, 7-a kaj 8-a de oktobro: 60 eŭroj.

Ne-loĝantoj en Andaluzio ne pagos aliĝon al la Kongreso.

Pliajn infomrojn pri loĝ-eblecoj kaj aliajn aferojn pri la 11-a Andaluza Kongreso de Esperanto vi trovos en [www.esperanto-andalucia.org](http://www.esperanto-andalucia.org) azu kontaktante kun la Malaga Esperanto-Asocio "Suna Marbordo" aŭ rekte kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

**NI ATENDAS VIN !**



# Atlantika Plonĝado

tie – tiam – tial – tiom – tiel

**Tie:** En *Areia Branca* (municipo *Lourinhã*) en Portugalio, 85 kilometrojn for de Lisbono. Ĝi estas malgranda vilaĝeto ĉe la maro.

**Tiam:** Unua semajnfino de Marto: 03-05 / 03 / 2006.

**Tial:** Praktiki Esperanton amuziĝante, konante aliajn lokojn kaj homojn ... sed se tio ne sufiĉas al vi la municipo *Lourinhã* kie situas *Areia Branca*, estas fama portugalie ĉar oni tie faris paleontologiajn malkovrojn; pro la vino; pro tio ke ĝi etas apudmara kaj iom rureca; pro la belaj ventmuelejoj kaj do, pro tio ke estas sufiĉe vizitinda kaj samtempe facile alirebla. Baldaŭ ni aldonos ĉi tie programon de la renkontiĝo kaj fotojn de la gastejo.

**Tiom:** Baldaŭ estos informoj.

**Tiel:** Se vi ne loĝas en Portugalio kaj planas vojaĝi per buso vi povas viziti la paĝaron de firmao Eurolines por informiĝi pri kelkaj ebloj. La paĝaro de la portugala trajnservo ankaŭ havas informojn pri internaciaj vojaĝoj. Estas tri internaciaj flughavenoj en la portugala kontinenta teritorio: Lisbono (centrokcidente), Porto (nordokcidente), kaj Faro (sude). Kaj per trajno kaj per buso facilas vojaĝi inter la tri urboj.

Kontaktu la organizantojn de la ATLANTIKA PLONĜADO en la adreso:

[plongxu@gmail.com](mailto:plongxu@gmail.com)



## Poezia Angulo

### Mi revas sur somera herbejo

Mi kuŝas sur homera herbejo  
kun tigo de lekanteto inter la dentoj  
kaj revas pri bela papillo.  
Kaj diable, jen iu ja jam alflugas,  
ĝi estas belega ekzemplero.  
Kun bluaj kaj nigraj partoj  
Kaj kun blankaj zigzagaj strioj  
Ĉe la randoj de la flugiloj.  
Ĝi memoras min pri la robo  
de dancistino. Ĉu de hispanino?  
Ĉu de ciganino, kiu dancas  
svingoriĉan flamenkon?  
Ĉu de ekflamiĝema hungarino?  
Ĉu de sambodancistino  
En la karnavalo de Rio?  
Ĝi eĉ briletas mistere  
kaj vere dancoflirtas  
proksime de mia nazpinto,  
kvazaŭ ĝi volus sekrete flustri ion  
al mi per Sian flugilaj ventumiloj.  
Sed jen la bela estaĵo subite jam florflugas  
en la foron de la herbejo,  
kie ĝi rapide perdiĝas.  
Mi pensas: Kial vi jam flugas for,  
bela dancistino?  
Mi iomete malĝojiĝas,  
sed mi ja devas akcepti tion,  
ke paipilioj estas tre liberaj estaĵoj,  
ke ili flugas nur laŭ la propra melodio.  
Nu, en ordo, mi pensas,  
flugu do plu tiel bele kaj fiere.  
Dancu plu vian elegantan ciganecan dancon  
por ĉiuj, kiuj ŝatas tion, ne nur por mi.

en nigran keston por ĉiam. Mi certe ne.  
Mi jam volas serĉi novan papilion,  
Kiun mi povus adore observi  
Kvazaŭ rigardvoluptulo.  
Sed jen ĝi ja revenas,  
jen ĝi efektive revenas,  
nia bela bunta papilio,  
kaj dancas ankoraŭfoje  
dum certa tempo nur por mi.  
Sur mia ĉemizo sur miaj brakoj,  
antaŭ la floro ĉe mia buŝo.  
Hehe, vi damnite bela papilio,  
ĉu vi eble aŭdis mian vokon,  
ĉu vi eble havas kompaton  
kun poeto kaj sentaŭgulo,  
kiu tiom adoras papiliojn?  
Ĉu vi tial estas tiel konfidema al mi?

CEZAR



## Turismi en .... ARACENA

Jam 3.000 jaroj a.K. ekzistis en la zono kie nuntempe stariĝas Aracena setlejo apud la hodiaŭ konata kiel Groto de la Mora. Kiam la romianoj venis, la Imperio profitis la mineralan riĉecon de la loko kaj tiel, ĉirkaŭ la minejoj, la romianoj starigis siajn vilaojn. Oni diras, ke unu el tiuj vilaoj, apartenanta al iu riĉa romiano sub la nomo *Aretius* aŭ *Arcius*, do kun la nomo *Villa Aretiana* aŭ *Villa Arciana*, estis la ĝermo de la nuntempa nomo *Aracena*. Dum la unuaj jarcentoj post la araba konkero, en la 8-a jarcento, Aracena estis loko kie loĝis la berberoj, sed en la 11-a jarcento ĝi estis grava tajfa regnolando, oni konstruis tiam la kastelon kaj la fontanon *Zulema*.



Azuleĥo reprezentanta  
la blazonon de Aracena

La portugala reĝo Sanĉo la 2-a konkeris la urbon en la jaro 1231 kaj dum la tuta 13-a jarcento la regnolandoj portugala kaj kastilia disputis pri Aracena. Finfine, pro la Traktato de *Alcañices* en la jaro 1297, Aracena definitive pasis al Kastilio. Tiutempe oni rekonstruis la araban fortikaĵo por defendi la urbon de la portugaloj.

La plej glora momento de la urbo estis la 19-a jarcento, kiam Aracena havis preskaŭ 5.000 enloĝantojn kaj sendube ĝia natura riĉeco, ĉefe pro ka vinarbaroj, olivujoj kaj porkaĵoj favoris la disvolviĝon de la vilaĝo ĝis la nuntempaj jaroj, kiam oni povas aserti, ke ĝi estas la ĉefurbo de la onuba montaro.

Al la altvaloraj naturaj produktoj oni devas aldoni lastatempe la turisman industrion kiu kreskis ĉirkaŭ la impona Groto de la Mirindaĵoj.



La kastelo de Aracena

Vizitinda estas ankaŭ la preĝejo de *Nuestra Señora del Mayor Dolor* kaj ĝia valora renascenza reĥo. Sendube unu el la plej belaj allogaĵoj de Aracena estas la Groto de la Mirindaĵoj. Ene de la monto kie starigas la kastelo trairas 1.200 metroj da galerioj viziteblaj de la publiko ekde la jaro 1914 kun centoj da stalaktitoj kaj stalagmitoj.

Vizitinda estas ankaŭ la preĝejo de *Nuestra Señora del Mayor Dolor* kaj ĝia valora renascenza reĥo. Sendube unu el la plej belaj allogaĵoj de Aracena estas la Groto de la Mirindaĵoj. Ene de la monto kie starigas la kastelo trairas 1.200 metroj da galerioj viziteblaj de la publiko ekde la jaro 1914 kun centoj da stalaktitoj kaj stalagmitoj.



Groto de la Mirindaĵoj

Vizitinda ankaŭ la muzeo de mineraloj kaj fosiloj enhavanta pli ol mil pecoj inter mineraloj, rokoj kaj fosiloj.

## Ĉefaj Festoj

Aracena estas grava produktejo de porkaĵoj. Do, oni okazigas regionan feston de la ibera porkaĵo la 19-an de oktobro. Okaze de la festo de la *Candelaria* oni prezentas ĉiujn infanojn naskiĝintajn dum la pasinta jaro al la Virgulino. Tio okazas la 2-an de februaro.

La pilgrimado al la preĝejo de la *Divina Pastora* okazas la 7-an de junio.



Placo en Aracena

## Tipaj Manĝaĵoj

Aracena estas plej konata pro la produktoj devenantaj el la ibera porko. Do, la ĉefaj manĝaĵoj havas tiun beston kiel bazon. Tiel, la *caldo de matanza* kaj la *guiso de menudo*. La naturo ĉirkaŭ la vilaĝo produktas kaŝtanojn kaj fungojn, manĝindaj ene de bongusta supo.

## Venontnumere

*TURISMI en..... CANENA (Jaeno)*

## MISTEROJ KAJ Legendoj De andaluzio

j.m.r.h.

### *Fantomogenezo ĉe la Norda Siero de Sevilo*

Jen rankonto kiu, kvankam povus ŝajni fantazio, oni povas certigi, ke ĝi estas tute certa. Okazis la 8-an de majo 1999 en vilaĝo de la norda Siero de Sevilo. Tiu sabato renkontiĝis, kiel kutime, 5 amikoj kiuj ŝatis ĉasi dumnokte en bieno apartenanta al unu el ili. Ili ĉasis kelkajn kuniklojn sabate nokte kaj ĝuis dum la dimanĉo manĝante ilin akompanitaj de siaj familianoj.

La unua kvar amikoj venis ĝustatempe, je la 12'00-a horo, sed Eduardo ne aperis. Unu el la amikoj komentis, ke dum la tuta tago Eduardo menciis, ke li ne fartis tre bone, li havis brak-doloron. Tag-meze li foriris ĉar li ne fartis bone, sed li promesis reveni dumnokte kiel kutime. Je la 1'30-a horo la kvar amikoj okupis sian preferatajn lokojn por ĉasi, je tiu sama horo ili vidis aperi Eduardon, kiu okupis ankaŭ sian lokon por ĉasi. Antono komentis, ke li ne vidis Eduardon pafi, li eĉ mokis pri li pensante, ke Eduardo simple estis dormema. Sed ne, li tute ne dormis.

Unu el la ĉas-hundoj kuris nerveze dum la tuta nokto, ĝi ne kruris post la kuniklojn, ĝi nur volis forfuĝi. Kiam finiĝis la ĉasado Eduardo simple foriris pergeste en la distanco kaj la 4 ceteraj amikoj iris en la kampar-domon.

Je la 9-a matene kiam la amikoj revenis en la vilaĝon ili trovis konatulon surstrate kiu diris: *kia granda domaĝo! Kompatindulo Eduardo!* Unu el la amikoj demandis: *ĉu Eduardo? Kio okazis al li? Ĉu vi ne konas la novaĵon?* – li respondis- *Li mortis hieraŭ nokte pro kor-atako. Je la 11-a nokte venis ambulanco por transporti lin kiel eble plej rapide, sed li mortis tuj apud la hospitalo.*

*Tute ne eble, alia amiko respondis, ĝis la 6'30-a frumatene li estis kun ni.* La amikoj ridis pro la stulta diraĵo de la konatulo kaj ili eniris en trinkejon. Kiam ili eniris tien alia konatulo tute serioze diris, ke ĉiuj bedaŭris la forpason de Eduardo. Li asertis ke je la 11'30-a horo nokte venis la ambulanco kaj je la 12'00-a horo li mortis preskaŭ ĉe la pordo de la hospitalo. La kvar amikoj ekscitiĝis. Eduardo mortis je la 12'00-a horo, sed je la 1'00, do unu horo

poste, li akompanis la aliajn amikojn dum la ĉasado, kaj li foriris je la 6'30-a horo matene. Ŝajne Eduardo akompanis ilin sed ne fizike, nur ne-materie. Eduardo aspektis normala, eble nur la hundoj komprenis ĉion kaj pro tio ili ekscitiĝis dum la tuta nokto. La kvar amikoj asertis, ke temis pri la lasta ĉasado de sia malnova amiko, li promesis iri ĉasi kiel kutime, kaj kvankam li mortis, li agadis laŭ sia promeso. Kelkaj esplorantoj parols pri parapsikologia fenomeno konata kiel "fantomogenezo", kiam oni vidas personon ĵus forpasinta en alia loko kaj li aspektas normala ulo.

---

## PETO

Saluton,

Mi intencas partopreni meznivelan ILEI-ekzamenon, kiu okazos dum la UK en Florenco (2006). Pri ILEI ekzamenoj vi povas legi en:

<http://www.edukado.net/pagina/Internaciaj+Ekzamenoj/150//>

mi ja ne ĵatus studi sola, certe estos pli enua tiel, do mi serĉas homojn por kune labori/studi cele de tiu Ekzameno, ĉu ni organizu intensivan kurson, mi jam pensis pri kelkaj homoj Andaluzie kiujn eble interesas la ideo.

Do, se fine mi trovas homojn pretajn studi por tiu Ekzameno, ni povus organizi la intensivan kurson, kio en praktiko signifas renkontiĝi unufoje monate. La kursoj povas esti duontagaj aŭ tuttagaj, tio dependas de la onta grupo. Ĉiujn aliajn detalojn mi preparolos kun eventualaj aliĝontoj. La kurso mem ne sufiĉas por ĉion scii/memori, do mi antaŭvidas hejmtaskojn.

En tiuj kursoj ni povos preparoli E-gramatikon (kun ekzercoj), E-historion kaj E-literaturon (kelkaj tekstoj), verkos eseojn, faros aŭskultekzercojn kaj fine klopodos fari 1-2 ILEI-ekzamenojn de la pasintaj jaroj.

Mi volus komenci en oktobro kaj fini en junio (t.e. 9 "lecionoj"). Dum la unua renkontiĝo ni certe provos preparoli la detalan programon kune kaj ni elektos la datojn de niaj aliaj renkontiĝojn.

Do, se vi interesiĝas pri mia iniciato, tiam aliĝu (por tio kontaktu min je la adreso [manuelortega87@hotmail.com](mailto:manuelortega87@hotmail.com) aŭ je la adreso [nigrastelo@hotmail.com](mailto:nigrastelo@hotmail.com) Ankaŭ kandidatoj por la elementa nivelo (ne tro facila!) estas bonvenaj.

Atendanta viajn reagojn... Amike, MANUEL.



## FAKAJ ASOCIOJ

Temas pri tiuj organizoj kiuj renkontigas siajn membrojn laŭ diversaj profesioj, mondkonceptoj, ŝatokupoj, ktp. Ni prezentas sube kelkajn el la plej gravaj kune kun la adreskontaktoj, eble al Vi interesas kontakti kun iu el ili.

**Skoltoj.** Skolta Esperanto-Ligo.

Héctor R. Campos Grez, Casilla 231 CL-334-000-0 CURICÓ (Ĉilio)  
www.esperanto.org/skolta Organo: *La Skolta Mondo*

**Sociala Laboro.** Asocio de Sociallaboristoj Esperantistaj.

Soile Lingman, Ringvagen 72-1 SE-118 61 STOCKHOLM (Svedio)

**Solidareco.** Monda Fonduso de Solidareco kontraŭ la Malsato.

Les Nids, FR-9190 Saint Aubin de Luigné (Francio)  
www.globidar.org Organo : *Monda Solidareco*

**Spiritismo.** Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz.

CP 3133 BR-20001-970 Rio de Janeiro RF-Brazilo  
Organo: *Komunikoj*

**Ŝako.** Esperanta Ŝak-Ligo Internacia.

Arvo Reede, Opetaja 27 EE-90506 Haapsalu (Estonio)  
Organo: *Esperanta Ŝako*

**Tradukado.** Internacia Traduk-Reto pere de Esperanto.

Daniel Durand, Les Nids, FR-49190 Saint Aubin de Luigné (Francio)  
www.komerco.com/itre

**Turismo.** Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz.

M. Sklodowskiej-Curie 10 PL-85-094 BYDOGSZCZ (Pollando)  
www.esperanto-turismo.com

**Universalismo.** Alianco Universala.

2001 Eleonon Road, Akroyali Avias, GR-24100 KALAMATA (Grekio)

**Ŭonbulismo.** Esperantista Asocio de Ŭonbulismo.

Shylyongdong 344-2 Iksanshi Chonbuk 570-754 Korea Respubliko  
www.uonbulismo.net

**Vegetarismo.** Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio.

Lilia Fabretto, Via Pietro Cartón 12/12 IT-00152 ROMA (Italia)

Organo: *Esperantista Vegetarano*.

**Verkistoj.** Esperantlingva Verkista Asocio.

Spomenka Štimec, Nova Ves 87, HR-10000 ZAGREB (Kroatio)

www.everk.org Organo: *EVA-rubriko*.

**Veteranoj.** Veterana Esperantista Klubo.

Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51 BE-8310 BRUGGE (Belgio)

**Vivstilo.** Movado Sen Nomo.


Frankrijklei 140, ANTWERPEN (Belgio)

www.xs4all.be/~esperan/msn/msnpagho.htm Organo: *Levilkartoj*

**Yumeiho-Terapio.** Monda Yumeiho-Societo.

IIPMP-Yumeiho Centro, CPO Tokyo Box 405, 100-8691 TOKYO (Jp)

www.yumeiho.co.jp



## NOVA ALBUMO DE TINĈJO EN ESPERANTO

Eldonita de CASTERMAN kun la prizorgo de la esperanto-grupo de Lille kaj Villeneuve d'Ascq (Francio).

Estas eble aĉeti ĉi tiun novan libron de la aventuroj de Tinĉjo tradukita en la internacian lingvon esperanton. La prezo estas 12 eŭroj.

Kontaktu kun:

esperanto14@supercable.es

Apartado 3142 14080 Córdoba

Ne forgesu aboni Vian kotizon por la kuranta jaro 2005 (kaj tiun de la jaro 2004 se Vi tion ankoraŭ ne faris). La aliĝ-kotizo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kostas 15 eŭrojn, se Vi jam kotizas en unu el la lokaj andaluzaj kluboj bv. kontakti kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Uzu unu el la jenaj banko-kontoj:

- BBVA: 0182 4106 71 0207160717

- Caja General de Ahorros de Granada: 2031 0225 54 0100187657

Bv. post pagi Vian jaran kotizon ne forgesi sciigi al la asocio pri Via pago. Uzu por tiu informo nian adreson en Malago, en Kordovo aŭ nian elektronikan adreson.

La venonta numero de GAZETO ANDALUZIA, tiu 78, aperos kiel Kongreslibro de la 11-a Andaluza Kongreso de Esperanto. La numero 79-a aperos dum la monato novembro.

Viajn kontribuadojn, opiniojn, sugestojn, kritikojn, kion ajn. bv. sendi al nia adreso:

GAZETO ANDALUZIA, Apartado de Correos 3142, 14080 Córdoba  
esperanto1@supercable.es

Vizitu en Interreto la jenajn paĝojn:

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo: [www.esperanto-andalucia.org](http://www.esperanto-andalucia.org)

Kordova Esperanto-Asocio: [es.geocities.com/esperantocordoba](http://es.geocities.com/esperantocordoba)

Jaena Esperanto-Asocio: [www.esperanto-jaen.tk](http://www.esperanto-jaen.tk)

Sevilja Esperanto-Asocio: [www.sevilo.tk](http://www.sevilo.tk)

Onuba Esperanto-Asocio: <http://groups.msn.com/EsperantoenOnubo>

Aksarkia Esperanto-Asocio:

<http://es.geocities.com/lorcacola/esperanto.htm>

## Andaluzia Esperanto-Unuiĝo Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

### Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López

Vic-Prezidanto: Rafael Sepúlveda Bernal

Sekretario: David Rodríguez García

Kasisto: Julio Herrero Segura

Voĉdonanto pri Propagando: José María Rodríguez Hernández

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj:   aarquillos@lycos.es  
                  esperanto14@supercable.es

TTT-paĝo: [www.esperanto-andalucia.org](http://www.esperanto-andalucia.org)

### Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

\* Universala Esperanto-Asocio  
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)  
[uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net)

\* Hispana Esperanto-Federacio  
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)  
[admin@esperanto-es.net](mailto:admin@esperanto-es.net)



11-a  
ANDALUZA KONGRESO  
DE ESPERANTO

Malago, la 8-an kaj 9-an  
de oktobro 2005

Organizas: Andaluzia Esperanto-Unuiĝo  
Kongresejo: Centro Cívico de Málaga  
Avenuo Guindos 48 Malago